

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Esperanto-Ligo en Israelo
האספרנטיסט הישראלי - ביטאון האגודה לאספרנטו

ISSN-1565 3315

ENHAVRIĈA PERIODO

Post la 20-a Israela kongreso okazis riĉaj postkongresaj ekskursoj, gviditaj de Amri Wandel.

Sur la foto internacia grupo da esperantistoj estas en Jordanio



BET-55 (Litovio). Post ukrainia koncerto far internacia grupo kun Gila kaj Amri.



Baltaj E-Tagoj estas tradicia renkontiĝo, kiu okazas jam dum 55 jaroj. Ĉi jare ĝi kolektis pli ol 400 homoj el 33 landoj en litovia urbo Panevezis. BET-55 similis al mini-UKo.

REVUO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)

La redaktoro
Mikaelo Lineckij

La reviziantoj:
Gabi Zeevi (Israelo)
La Andreo Peĉonkin (Rusio)

ELI-Prezidanto
Amri Wandel

La redakcia adreso: P.O.K. 22041, 61220 Tel-Avivo

**Karaj legantoj!**

Jam pasis printempo, somero kaj aŭtuno... Pri tio, kiel ili pasis, legu en nia revueto. Mi plu atendas vian subtenon - sendu informojn el via

Esperanto-vivo kaj aliajn interesaĵojn!

La materialoj akceptatas ĝis la 15.03.20!

retejo:

<http://esperanto.org.il/ie.html>

La enpaĝigo:

Mikaelo Lineckij
mikaelo@esperanto.org.il

Abontarifo eksterlanda:

10 eŭroj. Eblas pagi per UEA al la konto elia-q aŭ mendi ĉe Libroservo de UEA.

La enhavo:

Du semajnoj en Israelo kaj Jordanio	<i>A.Wandel</i>3
Rememoroj pri IK-20	<i>Seán Ó Riain</i>4
Kulturo kaj ekskursoj en IK-20	 5
BET? Kio estas BET?	<i>M.Lineckij</i>6
Modesta kvante, sed agrabla	<i>J.Ŝelaĥ</i> 9
La prezidanto adiaŭas	<i>A.Wandel</i> 11
Ekskurso al Ukrainio	<i>M.Lineckij</i> 12
La Nepo ne plu inter ni	<i>A.Wandel</i> 13
Somerfina Kunveno	<i>E.Salzman</i> 14
Norman Berdiĉevskij - prezento	 15
Pendol-diplomatio	<i>H.Kissinger</i> 16
Kontribuo de ukrainidevenaj judoj (la daŭrigo)	 17
Se vi...	<i>W.Churchill</i> 23
LITeraturaSUPlementO	 24
“Vero vivos!”	<i>Luiza Carol</i> 27
21-a Israela Kongreso	 28

Du semajnoj en Israelo kaj Jordanio

(Aperinta en “Ondo de E-o”, majo 2019).

Amri Wandel

Pli ol kvindek esperantistoj el 11 landoj partoprenis en la 20-a Israela Kongreso en Eilat, kiu unuafoje okazis kune kun MONA-kunveno, en la apuda urbo Akaba, Jordanio. La ĉeftemo estis “kunekzisto kaj ekologio en la Mezoriento”. Sekvis postkongresoj en Petra, la Morta Maro, Jerusalemo, Tel-Avivo kaj Haifa, kiujn partoprenis inter 10-20 kongresanoj, ĉefe el eksterlando. La programo estis senprecedence riĉa, kaj kune kun la postkongresaj ekskursoj la tuta aranĝo daŭris du semajnojn.

Jam antaŭ du jaroj en Israelo komenciĝis la preparado kaj la reklamado por la 20-a Israela Kongreso. Unue la intenco estis, ke la komuna aranĝo inkludu la Mezoriantan Kongreson, kiu fine okazis en Irano. Anstataŭe la kuna aranĝo nomiĝis “kunveno de la komisiono de Meza Oriento kaj Norda Afriko (MONA) de UEA. Dum pli ol unu jaro MONA kune kun ELI provis informi en Jordanio pri Esperanto kaj varbi jordaniajn partoprenantojn, kiuj fine ne estis trovitaj.

Muzike akompanis la kongreson Kajto kaj Jomo, kiuj kune havis 4 koncertojn. Krome okazis eŭritmia dancado de Tali kaj Franz kaj kantado de Erika. La ekskursiva programo dum- kaj postkongresa estis eksterordinare riĉa. Dum la kongreso oni vizitis la dezertan parkon Timna apud Eilat, grimpis la monton Cfaĥot kaj esploris la subakvan muzeon. Post la MONA-kunveno en Akaba 20 kongresanoj ekskursis al Wadi Rum kaj Petra, en suda Jordanio. Poste 15 kongresanoj vizitis la Mortan Maron, Masada, Ein Gedi, Jeriĥon, Jerusalemon kaj Tel-Avicon. Fine ĉ. dek kongresanoj vizitis la nordan regionon de Israelo – Haifa, la Bahaa Centro, Akko, Nazareto, kaj Lago de Galileo. Ĉiuj ekskursoj estis profesie ĉiĉeronitaj en Esperanto kaj akompanitaj per Esperanto-flagoj, kiuj ofte vekis demandojn kaj pe-tojn pri la informoj.

En la kleriga parto okazis du debatoj pri paco en la Mezoriento gvid-itaj de Renato Corsetti, laborgrupo pri Natura Moviĝo (Gila Wandel) kaj prelegoj pri Ben Yehuda, Zamenhof, Douglas Hyde – 3 homoj, 3 lingvoj (Sean O’Riain), Mirinda Ukrainio (Mikaelo Lineckij) kaj pri eŭritmio (Tali Wandel). Anna Lowenstein prelegis pri Facila UEA kaj Amir Naor - pri Verkoj.com. En Akaba okazis prelegoj de Amri pri *Bereŝit* - la israela spac-ŝipo kiu surluniĝis samtage kun la kongreso, kaj prelegoj de Sean O’Riain kaj Neil Blonstein pri la agado de UEA en Vieno kaj Novjorko, respektive.

20a Israela Kongresa Kongreso de Esperanto

Seán Ó Riain, Irlando

Mia edzino, Natalie, kaj mi ĉeestis ĉi tiun tre ĝojigan kongreson en Eilat, Israelo, kaj la postkongreson en Israelo kaj Jordanio. La filo de Natalie, Sébastien, akompanis nin dum parto de la vojaĝo. Estis mia unua vizito al Israelo ekde 1993, kaj min tre impresis la sperto.

Mia bona amiko, Amri Wandel, invitis min prelegi pri la irlanda lingvo dum la kongreso, por festi la Jarcon de Unuiĝintaj Nacioj pri Indiĝenaj Lingvoj, 2019, kaj paroli en Akabo, Jordanio, pri nia laboro por promocii Esperanton internacie en Vieno.

La kongreso kaj postkongreso estis tre bone organizitaj. Mi aparte ŝatis la fakton, ke ni estadis ofte ekstere kaj ni spertis multajn interesajn vidindaĵojn. Ni grimpis la monton Cfaĥot ekde Eilat frumatene, kaj de la pinto ni povis vidi Israelon, Jordanion, Saudan Arabion kaj Egiptujon. Tio estis impresa. La transiro de la limo al Jordanio daŭris pli longe ol atendite, kaj mi miris pri tio, ke israela buso ne rajtas simple eniri Jordanion, ĉar la du landoj jam antaŭ jaroj interŝanĝis diplomatajn rilatojn.

En Jordanio ni pasigis nokton en Akabo, alian nokton en la dezerto ĉe Wadi Rum, kaj trian nokton apud la antikva urbo Petra. Ĉi-lastan venis indis viziti, kaj la grimpado estis bonega fizika sperto, sed ne por ĉiuj! Kiam ni revenis Israelon ni grimpis Masadon antaŭ la sunleviĝo, por rigardi la sunon leviĝantan de tiu simbolo de ĝismorta juda rezisto al la romia regado. Tio alparolis min kiel irlandano.

Sekve de tio, ni tagmanĝis en la biblia urbo Jeriĥo kaj poste veturis al Jerusalemo. Ni alvenis al la Via Dolorosa en Sankta Vendredo, sed tro multis la homamaso por viziti la preĝejon de Sankta Tombo en tiu tago, do ni revenis la sekvan tagon. Por mi la plej elstara vizitindaĵo en Jerusalemo estis la preĝejo Pater Noster, kie Jesuo origine instruis la Preĝon de la Sinjoro al la disĉiploj, kaj kie oni nun povas legi tiun kortuŝan preĝon en pli ol 200 lingvoj, en altiraj surmuraj plakoj. La versio en Esperanto estas bele renovigita, kaj al mi plaĉis ankaŭ trovi versiojn en la keltaj lingvoj – la irlanda, la skotgaela, la kimra kaj la bretona. Afabla usona knabino montris al ni la vojon al la preĝejo.

Daŭrigo sur la paĝo 23



ANKAŬ LA KULTURA PROGRAMO ESTIS RIĈA.

Kun granda atento estis aŭskultataj la koncertoj de “Kajto” kaj de la eterne juna JoMo. Jen estas fragmentoj de iliaj koncertoj.



JoMo dancigas, kiel ĉiam



Improvizita dueto



Emocia kantado de “Kajto”

LA POSTKONGRESAJ EKSKURSAJ IMPRESOJ

Post Eilato okazis riĉa ekskursiva programo. Bedaŭrinde kapacito de nia modesta revueto ne permesas lokigi pliajn fotojn el tiu evento.



La grupo, ĉiĉeronita de Amri, vizitis la Bazilikon de Anunciacio en Nazareto, kie ni vidis la panelon de Maria en Esperanto, kaj la Lagon de Tiberi-ado, kie ni estis ĉe la kristanaj lokoj: Tabgha, kie okazis la fama miraklo far Jesuo pri panoj kaj fiŝoj.



Kun grupo da egiptaj monaĥoj.

Ĉe Tabgha (lago de Galileo)



BET? KIO ESTAS ĜI?

Mikaelo LINECKIJ

Iom de historio. Se ĉi jare okazis la 55-a BET, sekve, la komenco estis antaŭ 55 jaroj. Sed sep jaroj antaŭ tio, en la 1957-a en Moskvo okazis la Tutmonda Festivalo de Junularo, kaj jaron aŭ eĉ pli antaŭe, junuloj el diversaj landoj, kiu scipovis Esperanton, bombardetis la Organizan Komitaton de la Festivalo kun la demando: ĉu eblos renkontiĝi kun junaj sovetiaj esperantistoj?

Komece de 30-aj jaroj kaj ĝis mezo de la 50-aj de la XX-a j.c., Esperanto en Sovetio fakte estis, milde dirante, strikte malrekomendata. Sekve, restintaj post la persekutoj sovetiaj esperantistoj zorge kaŝis sian esperantistecon. Sed, pro planata en 1957 Internacia festivalo de Junularo en Moskvo, interesiĝo flanke de eksterlanda junularo pri renkontiĝoj kun junaj sovetiaj esperantistoj, estis decidite de Sovetia gvidantaro disponigi tiun eblon. Pro tio en la 1956 estis organizitaj preskaŭ devigaj E-kursoj gvidataj de prof. E.Bokarjov, en kiuj partoprenis ĉ. 30 personoj. Do, rezulte, la eksterlandanoj estis kontentigitaj, kio estis ege grava por la tiama sovetia gvidantaro. Estis ankaŭ alia bonaĵo - aperis novaj junaj E-aktivuloj.

Kaj kiel sekvo de tiu mildigo de la situacio rilate al Esperanto, la Movado denove ekĝermis en Sovetio: en urboj estis lanĉitaj kursoj, komencis aperadi rondetoj, poste la kluboj. En 1964 oni decidis okazigi la unuan postmilitan renkontiĝon. Oni nomis ĝin ĈET - Ĉebaltia E-Tendaro. En ĝi partoprenis plejparte junaj esperantistoj el Litovio, Latvio kaj Estonio. En la sekvaj jaroj okazis ĈET-2, ĈET-3, ĈET-4, en kiuj komencis aperadi junaj esperantistoj el aliaj partoj de Sovetio kaj oni ŝanĝis la nomon al Balta Esperanto Tendaro.



BET-52, urbo Birŝtonas (Litovio), kolektis ĉ.300 homojn. La indikitaj personoj partoprenos en IK-21 (krom Ĵomart kaj Nataŝa).

Post disfalo de Sovetio oni lasis la nomon, sed deĉifri ĝin necesis jam tiel: Baltiaj E-Tagoj kaj ili daŭre okazas laŭ la sama ordo: Litovio-Latvio-Estonio. La plej popularaj fariĝis litovaj BET-oj, en kiuj kutime partoprenas 250 - 300 esperantistoj el diversaj landoj. La 56-an BET-on okazigos Latva E-asocio. Tio estas eta ekskurso en la historion de BET-oj. Kaj nun plurakontos **Amri Wandel**:

Amasa kaj ĉarma BET - Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio.

Kvar israelanoj partoprenis la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET) okazintaj de la 6 ĝis 14 de julio 2019 en la litova urbo Panevėžysen. Aliĝis 450 homoj el 33 landoj, el kiuj efektive ĉeestis pli ol 400. La plej multaj partoprenantoj venis el Litovio, Pollando, Koreio, Latvio, Rusio, Francio kaj Germanio. La programo similis al tiu de UK-oj: prelegoj, koncertoj, ekskursoj kaj Esperanto-kursoj ĉiunivelaj. Paralele al la ekskursita tago, la loka Esperanto-klubo "REVO" preparis riĉan kulturen kaj distran programon, i.a. kun nacia koncerto, gustumado de lokaj manĝoj, ludoj, solena plantado de arbo, omaĝe al la 55-a BET kaj multe pli.

Aparte interesa por la israelanoj estis vizito de la juda komunumo kaj renkontiĝo kun ĝia gvidanto, kiu regalis nin per maco kaj rakontis pri la komunuma vivo. Partoprenis en la vizito ĉ. 20 BET-anoj.



Renkontiĝo en juda komunumo

La arta distra programo estis tre varia. Koncertis Sepa kaj Asorti, kiujn ni konas pro pluraj vizitoj en Israelon, Nataŝa Bertse, Mikaelo Bronŝtejn, Sergej Straŝnenko, Zuzana Kornicka. Aldone koncertis Kaŝi, Amira Ĉun, Jogaile Ĉojute, Françoise Noireau kaj aliaj. Aparte impona estis la Ukraina Koncerto, kiun gvidis Mikaelo Lineckij kaj Marina Moritz, kaj ili kantis kelkajn israelajn kantojn. En unu el ili, "Jerusalemo de Or", kunkantis ankaŭ Gila Wandel. La ukraina grupo, kies membroj nun loĝas en diversaj landoj, koncertos ankaŭ en la 21-a Israela Kongreso, sub la nomo A.M.U. Ĉiuvespere okazis improviziaj kunvenoj, kiuj daŭris ĝis malfruo, eĉ

nokte, kun konversacioj, komuna kantado, promenadoj, neformalaj noktaj koncertoj ktp. Foton post la ukraina koncerto vi povas vidi sur la kovrilpaĝo.

Tiu-ĉi BET estis impone subtenata de la lokaj intancoj: pluraj litovaj gravuloj sendis salutmesaĝojn, inter ili Vytenis Povilas Andriukaitis, membro de la Eŭropa Komisiono kaj Prof. Viktoras Pranckietis, Prezidanto de la Litova Parlamento (Seimas). La solenan inaŭguron ĉeestis la urbestro de Panevėžys s-ro Rytis Račkauskas, kiu invitis ĉiujn al la akcepto en la urba kultur-centro.

Same kiel dum UK, aperis ĉiutage Kuriero sub la nomo “Abelo”, verŝajne pro la loka miel-kultivado kaj ŝatado. Lerte ĝin redaktis sper-ta Esperanto-ĵurnalisto Stano Marček. Aparte impona estis la pli ol 150-paĝa “Kongresa Libro” pri BET, kun detala programo kaj multaj utilaj informoj pri la urbo, historiaj artikoloj pri la antaŭaj BET-oj, okazintaj dum pli ol duona jarcento seninterrompe, alterne en la tri baltiaj landoj.

Unuafoje Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) okazigis sian ĉefan jarkunvenon, la Sanmarinecan Universitatan Sesion (SUS), jam la 36-an fojon. La programo de SUS-36 estis abunda kaj diverstema. La tekstoj de ĉiuj prelegoj aperis en la IKU-libro (en kiu aperas ankaŭ la tekstoj de la Internacia Kongresa Universitato, dum la UK), kiu ĉijare estis eldonita en Israelo kaj presita en la presejo de “Israela E-isto”.



Dum la solena BET-inaŭguro, kiu okazis en la kultura centro de Panevėžys, salutis la prezidanto de AIS prof. Amri Wandel, kiu ankaŭ servis kiel la rektoro de SUS kaj sekve prezentis 3-prelegan kurson pri spac-teleskopoj, i.a. pri la fama Spacteleskopo Hubble kaj pri ĝia posteulo, la Spacteleskopo James Webb. D-ro Orlando Raola prezentis 5-prelegan kurson “Media kemio”, pri medio protektado. Krom kursoj okazis kadre de SUS ankaŭ pluraj disaj prelegoj: pri gravitaj ondoj kaj pri la fama nombro “ π ” (Pi), kaj pri la Baŭhaŭs-arkitektura stilo. La geredaktoroj de Revuo Esperanto prelegis pri fikcia literaturo, fabeloj kaj eskapismo (Anna Striganova), kaj pri modernaj sociaj retoj kaj Esperanto (Dima Ŝevĉenko). La ekologie gravan problemon de plastajoj en la diversaj akvosferoj prezentis Manfred Westermayer, la

Prezidanto de AVE, kaj Yves Nevelsteen prelegis pri Esperanto-bitlibroj kaj bitgazetoj, oftaj eraroj kaj novaj vortoj en Esperanto. En la kursoj de Wandel kaj Raola okazis ekzamenoj, kaj ĉirkaŭ tridek sukcesintoj publike ricevis AIS-atestojn en la solena ferma ceremonio de BET.

Post BET okazis tutsemajna ekskurso tra la baltiaj landoj: Litovio, Latvio kaj Estonio, kaj finiĝis en la UK en Lahtio. En ĝi partoprenis i.a. ĉ. tridek-persona grupo el Koreio, por kiuj tiu ekskurso estis “postkongreso” de BET kaj antaŭkongreso de UK.

MODESTA KVANTE, SED AGRABLA...

Jael Ŝelaĥ

Saluton, mi estas Jael!

Ĉi-jare mi partoprenis en la 104-a Universala Kongreso de Esperanto en Lahtio, Finnlando.

UK-oj okazis en Finnlando jam trifoje: la 14-a en Helsinki en 1922, la 54-a ankaŭ en Helsinki en 1969, la 80-a en Tampere en 1995. Ĉi-jare okazis la 104-a UK en Lahtio, je unuhora vetura distanco de Helsinki.

La Universala Kongreso okazis en malgranda nordeŭropa lando Finnlando* kaj en ties malgranda urbo Lahtio.

Lahtio estas urbo en Finnlando, kiu havas ĉirkaŭ cent mil loĝantojn kaj estas la ĉefurbo de la regiono kun ĉirkaŭ ducent mil loĝantoj.

Lahtio situas sur la suda bordo de pitoreska lago Vesijärvi (kion eblas traduki kiel “akvalago”), kiu troviĝas ne tre for de la kongresejoj. Verŝajne ĝuste pro tio la nomo de la urbo eblas traduki el la finna lingvo, kiel “golfo”. Somere la bordo de la lago estas tre bona loko por promeni, ripozi, kafumi kun amikoj post la streĉa taga kongresa programo. La slogano de la 104-a UK en Lahtio respegulas la kongresan temon “Vivanta naturo, floranta kulturo”

La naturo ĉeestas ĉie en Lahtio kaj ankaŭ en la kongresa temo. Kaj tio estas logike: la naturo estas eble la plej granda finna valorajo.

Tamen eĉ pli granda finna valorajo estas la pura, netuŝita naturo. La trankvileco dum luma vespero post agrable varmeta someratago. La luksa eblo havi puran akvon por trinki kaj puran aeron por spiri eĉ en la mezo de la urbo. En la Kongreso partoprenis 917 aliĝintoj el 57 landoj. De Israelo partoprenis, 6 homoj kun mi. Mi alvenis al Lahtio, al



la urbo, en kiu okazis la Kongreso... Mi estis tre surprizita, ke nenie en la urbo mi trovis informojn aŭ publikaĵojn pri la Kongreso...**
 Sabate matene mi provis marŝi de la hotelo ĝis la Kongresejo – forestas afiŝoj aŭ montriloj por informi la partoprenantojn pri la direkto. Ne estis eĉ la standardo ĉe la enirejo kal neniuj afiŝoj.
 Sed je la 9-a matene oni tamen hisis la Esperanto-flagon ĉe la enirejo al la Kongreso, kaj tion faris la lokaj dungitoj, kiuj ne parolis Esperanton.***

Ĉiutage dum la Kongreso okazadas renkontiĝoj de malnovaj amikoj kaj aperas iu nova, bela etoso... Ĉiutage estas nova programo, tago pasas, ankaŭ la alia tago ... La tempo pasas rapide, kiam vi ĝuas ...

Historia momento en la Kongreso – esperantista futbalteamo gajnis – 5 : 2! Tio okazis la unuan fojon dum multaj jaroj, kiam okazis similaj futbalmatĉoj inter E-teamo kontraŭ la loka, ke nia teamo gajnis la Pokalon! Mi ĝojis, ke mi estis en tiu festo! Ni renkontiĝu en la sekva Kongreso!



NDLR (Notoj de la redaktoro)

* Ne tiom malgranda estas Finnlando: la areo estas 338 430,53 km² - ĝi estas la 9-a laŭ la grandeco en Eŭropo. Por la komparo – areo de Israelo estas 22 072 km²...

** Tio estas granda manko de multaj E-kunvenoj – troa modesteco, eĉ avareco pri ekstera informado dum gravaj aranĝoj. Kaj post tio ni volas, ke oni atentu pri Esperanto? Pri la aktiva informado devus iniciati, zorgi kaj la organizantoj, kaj nepre UEA! Kiel minimume - organizi gazetarajn “rondajn tablojn” – ja okazas grava aranĝo, kunvenas homoj el kelkdekoj da landoj, de kelkaj kontinentoj. Granda internacia kunveno, okazanta sen interpretistoj/tradukistoj! Tio ja estas granda sensacio!!!

*** Mi opinias, ke UEA devas havi certan regularon laŭ kiuj la UK-organizantoj devas strikte sekvi ĉiujn bezonatajn kondiĉojn/regulojn.

LA LASTJARA AGADO DE ELI KAJ ADIAŬAJ VORTOJ DE LA PREZIDANTO

Amri WANDEL

Tradicie en la vintra Landa Kunveno la prezidanto de ELI raportas pri la jara agado. Ĉi foje mi ĝin faros la lastan fojon. Post mia 11 jara servo kiel prezidanto, mi decidis en 2020 ne plu kandidatiĝi. La ĉefa kialo estas mia elektiĝo kiel estrarano de UEA, kiu postulas multe da tempo. Plia kialo estas la bezono renoviĝi kaj varii.

Mi tamen plu plenumos la taskojn de reprezentanto de ELI en la Komitato de UEA kaj organizado de la Israela Kongreso.

En la pasinta jaro la Israela Kongreso festis sian 20-an datrevenan jubileon. Jam du jarojn pli frue mi proponis marki ĝin per 5-taga kunveno en Eilat kaj la apuda Akaba, kie ni organizis kunvenon de MONA (Mezoriento kaj Norda Afriko). La dujara planado kaj reklamado alportis rekordan nombron da eksterlandanoj - 25 - la plej granda nombro krom dum la Azia Kongreso en 2013. Simila nombro partoprenis la postkongresan ekskurson al Petra, inter ili ankaŭ pluraj israelanoj. Iom malpli partoprenis la ekskurson al la Morta Maro, Jerusalemo kaj Tel-Avivo, kaj laste Hajfo kaj la Galileo. La Kongreso kaj la postkongreso estis finance balancitaj.

Okazis E-kurso, instruita de Eldad kaj kunordigata de Amir. Aliĝis ĉ. 20 lernantoj, finis 12.

Dum la jaro aperis du numeroj de “Israela Esperantisto”, redaktitaj de la nova redaktoro Mikaelo Lineckij. Nun vi estas leganta la trian. Regule funkciis la klubo en Tel-Avivo, kaj kiel kutime okazis, la vintra kaj somera Landaj Kunvenoj, kun pli ol 30 partoprenintoj.

Lastjare UEA ŝanĝis la kotiz-sistemon, kaj rezulte la kotizo por Individua Membreco por israelanoj pli ol duobliĝis. Sekve en 2019 nur malmultaj el la ĉ. 50 israelaj IM-j renovigis la membrecon en UEA. Per streĉa kampanjo ni kun J.Tilleman sukcesis ŝanĝi tion kaj fine ĉiuj delegitoj kaj pluraj aliaj renovigis sian UEA-membrecon.

Ĉar tio estas mia lasta jaro kiel prezidanto, mi ŝatus resumi miajn plej gravajn projektojn dum la lasta jardeko.

Kiel redaktoro de IE mi redaktis n-rojn 148-166. Mi enkondukis la retan IE, kaj ekde n-ro 148 ĉiuj numeroj estas rete haveblaj.



Mi iniciatis la inviton al la 7-a Azia Kongreso de Esperanto al Jerusalemo kaj estis ĝia ĉeforganizanto. Post la UK en Tel-Avivo ĝi estis la plej granda internacia kunveno okazinta en Israelo.

Mi daŭrigis la tradicion pri partopreno en la Internacia Libro-Foireo en Jerusalemo, kaj organizis la budon de ELI en ĝi ĉiun duan jaron.

Mi redaktis kaj eldonis nome de ELI tri librojn: la memorlibron pri Esti, la memorlibron pri Josi (pli ol 400p) kaj la broŝuron kun mia traduko de la rakonto "Esperanto" verkita de Amos Oz. En 2011 mi redaktis kaj eldonis ka duoblan KD-on "Sidi Gefratoj Kune".

Mi prezidis ĉ. 100 estrarkunsidojn. Por ĉiu el ili mi preparis detalan tagordon, kaj poste helpis redakti la protokolon. En la lastaj tri jaroj la protokolo aperadas en la retejo de ELI, tiel ke ĉiuj membroj povas ĝin vidi.

Preskaŭ ĉiun semajnon mi verkis mesaĝon por la membroj, kiun mi foje sendis ankaŭ al la UEA-forumoj, kiel informilo pri la kuranta agado en ELI.

NDLR (noto de la redaktoro).

Laŭ mia opinio, ni devas esprimi grandan dankon al Amri pro la kontinua laboro dum 11 jaroj. Mi mem estis prezidanto de Ukrainia E-asocio kaj bone scias amplekson da zorgoj, kiuj plenigas la kapon de la gvidanto de socia organizaĵo.

venu en ukrainion - propono de mikaelo

Mi proponas fine de junio viziti kaj ekskursi dum 4-5 tagoj en mia naskiĝurbo, ĉefurbo de Ukrainio - Kijiv (longajn jarojn oni nomis la urbon de ruslingva formo Kiev, sed post anonco de la sendependeco en 1991, oni komencis uzi la ukrainlingvan formon Kijiv). Mi sufiĉe ofte dum pli ol 45 jaroj, faris ekskursojn tra la urbo por diverslandaj esperantistoj, kiuj vizitadis Kijivon, urbon, kiu havas pli ol 1500-jaran historion. Nepre okazos kunsido kun kijivaj esperantistoj. Kaj, por pli mergiĝi en internacian E-vivon, post la ekskursado tra Kijivo mi proponas kune partopreni en BET-56, okazonta en Latvio. Kio estas BET vi jam legis en nia revueto. Venu al E-familio kaj konvinkiĝu, ke tio estas vere interesa travivaĵo. Mi ĝuste scias, ke la impresoj de tiu vojaĝo longe kaj agrable vivos en viaj memoroj, kaj vi neniom bedaŭros pri tiumaniere pasigita tempo. Por la dezirantoj mi plezure rakontos la detalojn: +972-54- 3146626.

ZAMENHOF LA “NEPO” NE PLU INTER NI...

Amri WANDEL

Karaj geamikoj,

La 10-an de oktobro forpasis en la aĝo de 95 jaroj la nepo de Zamenhof. Ĉi-sube vi povas legi la Gazetaran Komunikon senditan de UEA:

Ludoviko Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF, en sia 95-a jaraĝo forpasis la 9-an de oktobro 2019, en Parizo.

La adiaŭa ceremonio okazis en familia rondo la 17-an de oktobro en la krematorio de la franca urbo Clamart kaj poste liajn cindrojn oni lokis en la kolumbarion de la tombejo en Sceaux, apud Parizo.


Komence de la krematoria ceremonio Jesper Jacobsen laŭtlegis la poemon “La vojo”, verkitan de Ludoviko Lazaro Zamenhof. La forpasinton adiaŭis la du filinoj Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Hanna Zamenhof-Zaruski kaj lin omaĝis Katalin Kovats, proksima esperantista amikino de la familio. La Esperanto-paroladojn de Margaret kaj Katalin interpretis al la franca lingvo Barbara Despiney kaj François Lo Jacomo.

La tombejan ceremonion partoprenis delegacio de la pola urbo Bjalistoko. Omaĝis al Ludoviko Kristoforo ZALESKI-ZAMENHOF, honora civitano de la pola urbo, Sinjoro Przemyslaw Tuchlinski, ĉef-deputito de la urbo, akompanata de sinjoro Jacek Brzozowski - direktoro de la urbodistrikto de la Bjalistoka Komununo.

Sekve Katalin Kovats laŭtlegis la mesaĝon de Duncan Charters, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio kaj François Lo Jacomo transdonis la mesaĝon de Probal Dasgupta, prezidanto de Akademio de Esperanto. La mallongan ceremonion fermis Margaret Zaleski-Zamenhof, la filino de la Nepo, laŭtleigante la poemon “Ho, mia kor’”.

Plurdekoj da familianoj, amikoj kaj tri reprezentantoj de la Esperanto-movado partoprenis en la postceremonia akcepto ĉe la domo de la forpasinto”.

Mia unua renkontiĝo kun La Nepo, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, estis en 1993, okaze de kunlabora restado en la astronomia centro Meudon, apud Parizo, post la UK en Valencio.



Mi tiam vizitis lin hejme, kun mia edzino kaj la komuna amikino Barbara Despiney. Estis agrabla etoso, ankaŭ plaĉis konatiĝi kun lia edzino. Li interesiĝis pri la sorto de niaj familioj dum la Holokaŭsto, kaj pri Israelo. La sekva renkontiĝo okazis post UEA-estrarkunsido en aprilo 1996. Mi



vojaĝis al Parizo kun la tiama prezidanto de UEA Chong Lee kaj kelkaj estraranoj, por viziti Uneskon kaj kontakti NeRegistarajn Organizojn. En la sekvaj jaroj La Nepo ofte aperis en Universalaj Kongresoj, kaj liaj salutoj, buŝaj aŭ mesaĝaj, fariĝis tradicia parto de la kongresa inaŭguro; kun varmaj, kortuŝaj vortoj li alportis la heredaĵon de sia avo, kaj la kongresanoj reciproke amis lin. En tiuj okazoj ni ĉiam agrable interparolis; foje li interesiĝis pri miaj IKU-prelegoj pri astronomio kaj astrofiziko, imponante per siaj vastaj konoj kaj sci-volemo. Kiam en Lillo li anoncis ke tio estis lia lasta UK, mi rifuzis kredi. Bonŝance, mi en tiu kongreso konatiĝis kun pluraj el liaj familianoj, aparte kun lia filino Margaret, kiu en la postaj Universalaj Kongresoj plu tenis la torĉon de la Zamenhof-familio. Tiu kontakto iom mildigas nun la senton de la perdo kaj adiaŭo, kiun lasas lia foriro.

Nome de Esperanto-Ligo en Israelo mi kondolencas al la familio kaj al la tuta Esperanto-komunumo.

SOMERFINA RENKONTIĜO EN KAFEJO EN TEL-AVIVO

Eldad Salzman

London, la 26-an de aŭgusto, la Israela Esperanto-Ligo havis sian tradician SOMERFINAN Kunvenon (SOFIK) en kafejo Alternativ' en Tel-Avivo.

Kiel kutime, la renkontiĝo okazis fine de la somero, post unumonata ferio en nia kluba agado. Amikoj el la tuta lando venis tien. Ni estis 23 membroj: el la centra regiono, el la nordo, el la ĉirkaŭaĵo de Jerusalemo, kaj eĉ el la sudo. Ĉiuj mendis pladojn el la menuo, kaj samtempe ni havis ankaŭ boneto-



sajn interparolojn kaj diskutojn. Kelkaj lernantoj el la ĵus finiĝinta kurso por komencantoj venis al la kunveno. Ankaŭ kelkaj novaj interesigantoj pri nia lingvo venis, kaj ni invitis ilin al niaj semajnaj klubaj renkontiĝoj. Ni ankaŭ informis ilin pri materialoj, kiuj servis al nia kurso por komencantoj.

Mi ŝatus aparte danki al Miĥal, kiu sindone prizorgis ĉion malantaŭ la kulisoj kaj preparolis ĉion kun la estro de la kafejo. La vespero estis tre agrabla kaj sukcesa. Ankaŭ la loka servado de la kelneroj estis senripoĉa. Dankon al ĉiuj, kiuj alvenis kaj kontribuis al la bela etoso en la kafejo.

PERMESU PREZENTI: NORMAN BERDIĈEVSKI

Norman Berdiĉevski: *“mi estas eksmembro de la E-movado en Israelo, kie mi loĝis en Riŝon Le-Cion dum dudek jaroj. Mi verkis teatraĵon, kiu aperis en “Litova Stelo” (1994, vol. 4) antaŭ 25 jaroj kaj mi opinias ke la enhavo havus specialan historian taŭgecon en “Israela Esperantisto” por judoj, poloj, baltoj kaj aliaj popoloj, kiuj riveladis kaj interbatalis spite al la minaca nazia danĝero en la tridekaj jaroj. La teatraĵo traktas ankaŭ mankon de unueco inter esperantistoj, kiuj forte serĉis pli aktivajn propagandilojn por influi la publikon por eviti la fenomenon de “Kabeismo.”*



Nun li loĝas en Orlando, Florido. Li havas doktorecon pri homa geografio ĉe la Universitato de Viskonsino-Madison (1974) kaj estas la aŭtoro de Modern Hebrew - La Pasinteco kaj Estonteco de Revivigita Lingvo, (McFarland Publishing, 2014). Li estas aŭtoro de pli ol 350 artikoloj kaj librecoj aperintaj en diversaj usonaj, britaj, danaj, israelaj kaj hispanaj periodaĵoj. Krome li estas preleganto pri Karibaj Krozaj Linioj, Venkoj de Vikingoj, kaj privata preleganto por politikaj organizoj, komunumaj centroj, preĝejoj kaj sinagogoj.

Planatas komenci aperigi lian teatraĵon en la sekva “Israela Esperantisto”.

Diplomatio kiel arto, ekzemple de geedziĝo.

Jen estas ĝi, vera arto en traktado de la kondiĉoj. La nivelo - supera!

Foje oni demandis Henry Kissinger: kio estas pendoldiplomatio?

Kissinger respondis: Ho, ĝi estas universala juda metodo! Jen estas la klarigo: vi volas per metodo de pendoldiplomatio edzinigi filinon de Rockefeller al simpla junulo el rusia siberia vilaĝo. Kiel tion eblas fari?

Mi veturas al rusia vilaĝo, trovas tie simplan junulon kaj demandas:

— Ĉu volas vi edziĝi al usona judino?

Li respondas:

— Kiucele? Ĉi tie junulinoj pli ol abundas.

Mi al li:

— Jes, sed ŝi estas filino de miliardulo!

— Ho, tio estas tute alia afero...

Poste mi veturas al Svislando por kunsido de estraro de la ĉefa banko kaj demandas:

— Ĉu vi volas havi kiel prezidanton de via banko viron el Siberio?

— Ne, certe ne – oni respondas.

— Kaj se li estas bofilo de Rockefeller?

— Ho, estas tute alia afero!

Poste mi veturos al hejmo de Rockefeller kaj demandas lin:

— Ĉu volas vi havi kiel bofilon junan rusian viron?

— Pri kio vi parolas? En nia familio ĉiuj estas financistoj!

— Sed li estas prezidanto de svisa banko!

— Nu, tio estas tute alia afero!

Rockefeller vokas la filinon:

— Suzi, venu ĉi tien, ni trovis por vi fianĉon. Li estas prezidanto de svisa banko!

— Fi... Ĉiuj tuj financistoj estas aŭ febluloj aŭ gejoj!



Henry Kissinger

Mi diras al ŝi:

— Sed li estas juna, forta siberia viro!

— Ho-o-o-o-o! Tio vere estas treege interesa...

Traduko de M.Lineckij


KONTRIBUO DE UKRAINIDEVENAJ JUDOJ POR ESTABLO DE ISRAELO (la dua parto)

USIŜKIN Abraham Menaĥem Mendel, 1863 - 1941

Li naskiĝis en monhava ĥasida familio, kaj de la infaneco ricevis tradician judan kleron. En la jaro 1889 li finis Moskvan Superan Teknikan Klerigejon, akirinte diplomon de “inĝeniero-teknologo”.

De la jaro 1881 okazas lia aliorientiĝo al la vojo de juda lidero.

A.Usiŝkin kune kun J.Ĉlenov fondis en Moskvo palestinecan rondeton, kaj en 1884 kune kun Jakov Maze, Petro Marek kaj Jeĥiel Ĉlenov Asocion de Judaj Studentoj Bnej-Cion, kaj post unu jaro li fariĝas sekretario de la movado Ĥovevej Cion en Moskvo. Post la vojaĝo al Erec-Israel en 1891 li ekloĝis en Jekaterinoslav (nuna Dnipro, Ukrainio), kiu danke al li dum la sekvaj 15 jaroj fariĝis unu el la centroj de la juda nacia renaskiĝo en la Rusia Imperio. Post la kiŝineva pogromo en 1903 Usiŝkin organizis forveturon al Erec-Israel de judaj orfoj kaj veturis kun ili, alvokinte la setlanojn lanĉi reprezentan organon “jiŝuva” kaj



per tio praktike legitiminte la judan ĉeeston en la lando. Usiŝkin havis gravan rolon en la fondo de juda universitato en Jerusalemo. En la jaro 1912 en la 8-a konferenco de Ĥovevej Cion li sukcesis interkonsenti pri 50 miloj da oraj frankoj por aĉeti parcelon sur la monto Skopus en Jerusalemo. En 1925 li partoprenis en ceremonio de oficiala malfermo de la universitato kaj estis elektita kiel membro de kuratora soveto.

FONDO DE TEL-AVIV


En la jaro 1906 horloĝisto el Lodzo (Pollando) Akiva Weiss ekloĝis kun sia familio en Jafō. La sekvan tagon post la veno li proponis fondon de negrandan judan setlejon de urba tipo por 40-50 domoj.

Tuj troviĝis dubantoj, kiuj faradis demandojn al tiu novulo, kiu ĵus elŝipiĝis kaj malbone orientiĝis en la loka vivo. Akiva Weiss sukcesis konvinki la kunvenintojn, kaj ili konfirmis projekton de la estonta juda urbeto. Estis fondita kompanio nomita “Aĥuzat-Bajit, aŭkcia societo por konstrui domojn en Jafo”. Ĝis la fino de 1906, 36 homoj investis la monon por konstrui la domojn. Jen estas kelkaj nomoj de tiuj, kiuj faris multon por fondi la estontan urbon: Jeĥezkel Danin-Suhovolskij el Bialistoko, Aviva Beis el Lodzo el Pollando, David Smeljanskij kaj Jichak Ĥajutman el Ukrainio, Meir Dizengoff el Besarabio. En la jaro 1912 en Tel-Avivo okazis la unua censo: 94 konstruitaj domoj kun 502 loĝĉambroj, 135 kuirejoj, 106 banĉambroj. La loĝantaro – 790 homoj, el ili 363 viroj kaj 427 – virinoj. La hebrean parolis 43%, la jidan – 35%, la rusan – 11%, kaj la restantaj parolis la germanan, francan, anglan, hispanan kaj araban lingvojn.



DIZENGOFF Meir, 1861 – 1936

Li naskiĝis en Besarabio (nuna Moldavio), lernis en Kiŝinevo, militservis en Ĵitomiro (Ukrainio), poste studis en teknikumo “Laboro” en Odeso (Ukrainio), kie li studis fandadon. Pro la revolucieca agado li estis enprizonigita en 1885-1886. Post la liberiĝo li fariĝis aktivulo de la movado Ĥovevej Cion. En 1892, ricevinte inviton de Edmond de Rotŝild, venis en Erec-Israel por okupiĝi pri fondo de vitrofabriko por produktadi vinbotelojn apud Ziĥ-ron-Jaakov, kie jam funkciis vinproduktejoj. Dizengoff konstruis fabrikon “Ha-Mizgaga” en Tantura (Dor). De 1897 ĝis 1905 li loĝis en Odeso, laboris en belga vitrouzino, sed ne ĉesigis la socian agadon. Li partoprenis la 5-an kaj 6-an Cionistajn Kongresojn. En 1903 kun V.Ĵabotinskij estis inicianto de judaj defendtaĉmentoj. En 1909 li fariĝis unu el la fondintoj de la juda setlejo Aĥuzat-Bajit apud Jafo, kiu poste fariĝis Tel-Avivo.



En 1910 Dizengoff estis elektita kiel estro de komitato de la nova urbeto. En 1921 kaj ĝis fino de sia vivo li estis urbestro de Tel-Avivo, multe kontribuante al la disvolvo de la urbo. Dizengoff revis fari Tel-Avicon kiel tipa okcidenteŭropa urbo kaj lia revo fakte efektiviĝis.

JICHĀK Ben Cvi (Ŝimŝeleviĉ), 1884-1963 (La dua Prezidento de Israelo 1952 - 1963)


Li naskiĝis en Poltavo (Ukrainio), lernis en juda lernejo, gimnazio, dum ioma tempo frekventis Kijivan Universitaton. En 1906 li partoprenis en la fonda konferenco de la juda social-demokratia partio Poalej Cion en Poltavo, kaj kunlaboris kun B.Boroĥov pri la kompilo de ties programo. En 1907 Ben Cvi ekloĝis en Erec-Israel. Kune kun Raĥel Janait, kiu poste fariĝis lia edzino, li organizis judan gimnazion en Jerusalemo. En 1915



Ben Cvi kaj David Ben Gurion estis arestitaj de la turka estraro kaj deportitaj el Palestino. Li multe okupiĝis pri scienca agado kaj en 1948 ekestris instituton por esploro de orientaj judaj socioj. En 1952 li estis elektita kiel Prezidento de Israelo. Li opiniis, ke prezidento devas esti publika homo, kaj ties loĝejo – modesta. Dum 26 jaroj li loĝis kun la familio en ligna dometo en jerusalema distrikto Reĥavia. Poste la ŝtato aĉetis la najbaran domon por plibonigi la kondiĉojn de la prezidenta rezidejo.

ĴABOTINSKIJ Vladimir (Zeev), 1880-1940

Vladimir Ĵabotinskij estas unu el la plej elstaraj figuroj en la juda nacia renesanco. Literaturisto, publicisto, felietonisto, poeto, verkisto, dramverkisto, tradukisto, eksterordinara oratoro kaj poligloto... Li faris multon por la renaskiĝo de la hebrea kaj estis inter la fondintoj de la teatro “Habima”. Li naskiĝis en Odeso, en asimilita juda familio. Lia patro naskiĝis en Nikopolo (Dnipropetrovska provinco) kaj la patrino - en Berdiĉevo (Ĵitomira provinco). Vladimir lernis en rusa gimnazio, en la 16-jara aĝo li estis



publikigita en la ĵurnalo “Odesa folio”. Dekokjara Vladimir jam sendas la artikolojn el Svisio, kaj poste – el Italio. Superan kleron li ricevis en Roma Universitato.

Post pogromo en Kiŝinevo en la jaro 1903 Ĵabotinskij venis tien por helpi al la suferintoj. En la detruita sinagogo li trovis peceton de ŝirita Torao: de la frazo “Mi fariĝis alveninto en la fremda tero”, restis nur du vortoj “en la fremda tero”. Li konsideris en tio profundan sencan – de tiu momento li fariĝis cionisto, lanĉis la defendajn taĉmentojn, partoprenis en cionistaj kongresoj; liaj artikoloj en ruslingvaj kaj judaj ĵurnaloj elvokis multnombrajn reeĥojn, dum liaj paroladoj la salonoj estis ĉiam plenplenjaj.

BOROĤOV Ber Dov, 1881-1917

Li naskiĝis en urbo Zolotonoŝa (Ĉerkasa provinco), mortis en Kijivo. Dum siaj nelongaj 36 jaroj li sukcesis:

- fariĝi konstrukciisto de teorio de cionisma marksismo;
- krei cionistan socialisman laboristan union en Jekaterinoslav (nun - Dnipro);
- labori en Usono kiel reprezentanto de Poalej Cion;
- proponi la ideon pri kreo de tutmonda juda kongreso kaj de usona juda kongreso;



- krei sciencan verkon “Juda laborista movado per ciferoj” kun profunda kaj originala analizo de la socia strukturo kaj ekonomiaj procezoj en la juda medio;

- disputi kontraŭ A.Lunaĉarskij (la unua popolkomisaro pri klerigado en Rusia Federacio en 1917-1929) en la verko “Virtualismo kaj religi-etna problemo en marksismo” kaj grave kontribui al filologio de la jida lingvo en la verko “Di ojfgaben fun der jidiŝer filologie” (“Taskoj por la jida filologio”) en la 1913 kaj “Di bibliotek fun dem jidiŝ filolog” (“Biblioteko de juda filologo”) – bibliografio de 400-jara esplorado de la jida lingvo).

Ber Boroĥov estis bonega oratoro. Li paroladis en urboj kaj setlejoj, alvokante judojn al transloĝiĝo al Erec-Israelo.



En unu el tiuj vojaĝoj li ekmalŝanis pri pneŭmonio kaj mortis en decembro 1917. En 1963 liajn restaĵojn oni translokigis en Israelon kaj ili estis entombigitaj ĉe la bordo de la Lago Kinereto apud la tomboj de aliaj konstruistoj de la socialisma cionismo.

TRUMPELDOR Josif 1880-1920


Li naskiĝis en Kaŭkazio en familio de milit-sukuristo. Unu el la nemultaj klerigejoj, kien oni akceptis judojn, estis sukurista lernejo, kiun li finis en 1900. Trumpeldor en 1902 estis mobilizita en la armeon. La militservon li komencis en Kijivo. En 1904 komenciĝis rus-japana milito, kaj Josif skribis peton sendi sin al la fronto. Servado en la lazareto ne estis plaĉa, kaj li petis sendi lin al la regimenta skolta teamo. Ĉe la unua sturmo de Port-Arturo li estis grave vundita,



kaj oni estis devigitaj amputi lian maldekstran brakon ĝis la kubo. Post la elhospitaliĝo li rezignis evakuiĝi, kaj donis al la komandanto peton: “Mi havas nur unu brakon, sed tiu unu estas la dekstra. Tial, dezirante daŭre dividi kun miaj kamaradoj la militan vivon, mi petas Vian moŝton doni al mi sabron kaj revolveron”. Li restis inter la defendantoj de Port-Arturo ĝis la fino, kaj li fariĝis kvarobla kavaliro de la ordeno “Georgo-kruco”.

“Estas bone morti por la Patrujo” – tiun frazon de Josif Trumpeldor scias ĉiu israelano. Legendeca homo, simbolo de heroismo kaj cionismo Josif Trumpeldor estas vaste konata en la mondo – lian nomon portas stratoj kaj placoj, sportaj kluboj kaj sociaj organizaĵoj. Post la falo de Port-Artur la japanoj lokis 10 mil militkaptitojn, inter kiuj estis kelkcentoj da judoj, sur unu el la insuloj. Trumpeldor lanĉis tie komitaton de judoj-militkaptitoj, fondis sinagogon, lernejon, bibliotekon, teatran trupon, kason “Interhelpo”, redaktis kaj eldonis ĵurnalon “Der jidiŝe leben. Bnej-Cion ĥa-ŝvuim be-Japan” (“Juda vivo. Filoj de Ciono en japana kaptiteco”), antaŭ la Pasko-festo persvadis la gardistojn doni iom da faruno por baki macon. Trumpeldor turnis sin al la estraro de la kaptitejo kun propono organizi lernejojn. Kaj la japanoj reagis al la propono – estis

konstruita ejo kaj akiritaj bezonataj lernolibroj. Kune kun Trumpeldor instruis tie ankaŭ rusaj oficiroj. Tiu informo pri la agado de Josif atingis la japanan imperiestron, kaj oni veturigis lin al la palaco. La imperiestro, aŭdinte pri la agado de Trumpeldor, diris, ke li volas siamaniere distingi lin. La Mikado donacis al Josif anticipe preparitan brakprotezon kun surskribo: “Ĉi tiun brakon donacas la japana imperiestro al la heroo



Trumpeldor pro lia utila agado dum la kaptitrestado”. Monaton post reveno de la milito Trumpeldor ricevis avizon el Peterburgo: “La Kancelario de Lia Moŝto petas vin veni por rekontiĝi kun la imperiestro Nikolao la Dua”. Kun grupo da kavaliroj de Georgo-kruco Trumpeldor venis al la Cara Vilaĝo (la cara rezidejo). En la salonon eniris la imperiestro kun la edzino. Sur la tableton apud Josif estis metitaj du oficiraj epoletoj. Nikolao la Dua diris al Trumpeldor: “Mi dankas vin pro la servado kaj

gratulas vin okaze de ricevo de la unua oficira rango”. Rigardinte la skribaĵon sur la protezo, la caro proponis al la heroo elekti specon de la posta agado, inkluzive abituradon en Milit-medicina akademio, kiu fakte estis fermita por judoj. Trumpeldor respondis, ke li volus ricevi kleron en jura fakultato de Peterburga Universitato. La caro deziris al li sukcesojn. Josif Trumpeldor fariĝis la tria judo en Rusio, kiu, kiel escepto, fariĝis oficiro.




Traduko de M.Lineckij

Daŭrigota en la sekva numero, en kiu temos pri: Eŭg.Ratner, Ŝ.Dajan, P.Rutenberg, G.Meir, M.Ĉertok, E.Kacir, L.Eŝkol kaj aliaj ukrainidevenaj judoj.

SE VI...

“...se vi komencas vian tagon sen kafeino, se vi ĉiam povas esti vivoĝoja kaj ne atenti la dolorojn kaj malsanetojn, se vi povas reteni vin de plendoj kaj ne molesti homojn per viaj problemoj, se vi povas manĝi la saman manĝaĵon kaj ĉiutage esti danka pro ĝi, se vi povas kompreni la amatan homon, kiam tiu ne havas por vi tempon, se vi povas malatenti kulpigojn de la amata homo, kiam io okazas ne tiel (ne pro via kulpo), se vi povas trankvile akcepti kritikojn, se vi povas percepti vian malriĉan amikon samtiel kiel la riĉan, se vi povas ne atenti mensogojn kaj trompojn, se vi povas batali kontraŭ streĉoj sen kuraciloj, se vi povas malstreĉiĝi sen uzo de alkoholaĵo, se vi povas ekdormi sen tablojdoj, se vi povas sincere diri pri manko de superstiĉoj kontraŭ haŭtkoloro, religiaj konvinkoj, seksumorientiĝo aŭ politiko – tio signifas, ke vi jam atingis evolunivelon de via hundo...”



Winston Churchill
Traduko de M.Lineckij

Daŭrigo de la paĝo 4

Kio estis por mi la plej memorinda parto de la vizito? La amikeco kaj helpemo de ĉiuj israelanoj, kiujn ni renkontis. La pozicio de virinoj (plej multaj el ili tre belaj!) en Israelo kontraste kun ilia pozicio en Jordanio.

En ĉi tiu lasta lando ni malofte vidis virinojn, kaj kiam ni ja vidis ilin, ili estis vualitaj de kapo al piedo. En Israelo virinoj ludas gravan rolon en ĉiuj aspektoj de la socio, de flughavenaj kontroloj tra polico ĝis militservo. La najbaraj landoj havas tiom multe por lerni de Israelo, se ili nur povus venki siajn antaŭjuĝojn, viziti Israelon kun malferma menso, kaj permesi al si admiri la miraklon de tiu belega kaj mirinda lando, kiu revivigis sian antikvan lingvon (la sola lando iam ajn kiu sukcesis tion fari) kaj igis la dezerton flori. Am Yisrael chai!





*Hodiaŭa porcio de la LitSupO startas de internacie
ŝatata temo - judaj anekdotoj.
(Tradukoj de M.Lineckij)*

Judaj anekdotoj kutime kaŭzas enpensigan rideton, sed ne ridegon!

Jen kio estas interesa: granda rusia pentristo Isaak Levitan naskiĝis en malriĉa juda familio... Naskiĝi en judaj familioj bonŝancis multaj grandaj rusiaj sciencistoj, verkistoj, pentristoj kaj komponistoj...

Sarah diras al Moĉjo:

- Ajna junulino povas tre facile altiri la atenton: ŝi surmetas ruĝan robon - ĉio!

Moĉjo:

- Nu, ankaŭ por junulo tio ne estas problemo: li surmetas ruĝan robon - ĉio!

Renkontiĝas Sonjo kaj Fira:

- Kara mia, vi tiel dikiĝis!

- He, mi jam maldikiĝis. Se vi vidus min antaŭ tri monatoj - mi estis sama kiel vi nun...

- Fimĉjo, kio estas feliĉo?

- Retorika demando, Jaĉjo... Feliĉo - estas stato, kiam oni al vi envias, sed neniel povas fuŝi ...

- Diru al mi, sinjoro rabeno, kion eblas peti de Dio?

- Petu tion, kio mankas por vi. Se vi jam ĉion havas - petu pardonon...

Nova instruisto, veninta en la klason, rimarkis, ke unu knabon oni moknomas Moĉjo-stultuleto. Inter la lecionoj li demandis la infanojn, kial ili tiel nomas la knabon?

- Sinjoro instruisto, li vere estas stulta. Se oni proponas al li grandan 5-siklan moneron kaj malgrandan 10-siklan, li ĉiam elektas grandan 5-siklan, ĉar li pensas, ke ĝi estas pli valora... Nu, jen, rigardu...



La knabo elpoŝigas du monerojn kaj proponas al Moĉjo elekti. Tiu, kiel ĉiam elektas la 5-siklan.

- Kial vi elektis la 5-siklan moneron, sed ne la 10-siklan?

- Vidu, sinjoro instruisto, ĝi ja estas pli granda!

Post fino de la lecionoj la instruisto alvenas Moĉjon:

- Ĉu vi ne komprenas, ke 5-sikla monero nur dimensie estas pli granda, sed kontraŭ 10 sikloj eblas aĉeti double pli?

- Certe komprenas, sinjoro instruisto.

- Kial do vi elektas la 5-siklan moneron?


- Ĉar, se mi prenos la 10-siklan moneron, oni ne plu donados al mi la monon!

Sarah kaj Abram prepariĝas iri gasti. Sarah:

- Se vi sciuz, karulo, kiel mi ne volas iri al tiu Abramoviĉ.

- Pri kio vi parolas, karulino! Vi nur imagu, kiel li ekĝojos, se ni ne venos...

- Jes, vi pravus, necesas iri...



- Sonjo, vi estas junulino el miaj revoj: bela, inteligenta, gaja...

- Jaĉjo, mi suspektas, ke vi volas kun mi pasigi nokton, ĉu?

- ... ankaŭ saĝa!

Judo, veninta hejmen per taksio, eliras el la aŭto kaj komencas serĉi ion en la poŝoj, balbutante:

- Diablo, kie estas la monujo? Verŝajne en la aŭto elfalis.

Ekaŭdinte tion, la ŝoforo tuj startas kaj forveturas. La judo, rigardante la malproksimiĝantan aŭton, kontente diras:

- Jes, Rabinoviĉ ne mensogis - tio vere efikas...

“Ekzistas aferoj malpli bonaj ol malbonaj lernonotoj”

Estis lasta lernotago. Patro, preterirante la ĉambron de la filo, atentis, ke en ĝi regas ordo, eĉ la lito estas sternita. Aperis sento, ke la filo kolektis siajn aĵojn kaj forveturis.



La suspekto de la patro pliiĝis, kiam li rimarkis leteron sur la malplena tablo. Sur ĝi, per skribmaniero de la filo, estis skribite “Por paĉjo”. Per tremantaj manoj la viro malfermis la koverton kaj tralegis:

“Kara paĉjo, mi volas informi Vin, ke mi estas devigita foriri el la hejmo kun mia nova amikino, ĉar mi estas certa, ke Vi kun panjo faros skandalon. Mi tre amas la amikinson. Sed mi scias, ke vi ne aprobos niajn interrilatojn pro ŝiaj korporingo kaj tatuajoj, motorciklecaj vestaĵoj kaj tion, ke ŝi estas signife pli aĝa ol mi. Kaj konsiderindas ne nur la sentoj. Ŝi estas graveda. Ŝia nomo estas Sarah. Ŝi certas, ke ni estos feliĉaj kune. Ŝi havas en la arbaro ruldomon kaj amason da brullignaĵo, kiu estas sufiĉa por la tuta vintro. Ni revas havi multe da infanoj. Sarah certas, ke mariĥuano fakte estas ne tre malutila. Ni planas kreskigi ĝin por nia uzo kaj vendi al aliuloj por ke ni havu monon por kokaino – ankaŭ ĝi ne estas danĝera, se uzi ĝin modere.

Krome, ni preĝos, ke estu inventita kuracilo kontraŭ AIDS-o, ĉar necesas kuraci Sarah-n – ŝi meritas tion!

Ne maltrankviliĝu, paĉjo, mi havas jam 15 jarojn kaj povas mem prizorgi min. Foje ni gaste venos al vi por konatigi vin kun la nepoj. Amante, Via filo Jehoŝua.



Ĉiuj homoj povas kaŭzi
feliĉon ...
Iuj - per sia apudeco...
Iuj - pro sia foresto...

P.S. Paĉjo, ĉion supreskribitan mi elpensis. Mi nun estas ĉe mia amiko Jason. Mi simple volis aludi al Vi, ke povas esti io malpli bona ol nebonaj pointoj en la lernotabelo (ĝi kuŝas sur la kuireja tablo). Telefonu, kiam eblos reveni

ni! Mi amas vin!

Traduko de M.Lineckij

ANKAŬ TIEL POVUS OKAZI...



En urbeton venas riĉa turisto.

Lasinte al la hotelestro 100\$ kiel garantiaĵon, li iras rigardi la hotelĉambrojn.

La estro, ne prokrastante eĉ minuton, prenas la monon kaj kuras al viandisto nuligi la ŝuldon. La posedanto de la viandejo kun tiu mono kuras al farmisto kvitiĝi pro la prenita viando. La farmisto kvitiĝas kun la aŭtoriparejo. La posedanto de la riparejo kuras al junulino, kiu pro financa krizo “komplezis” lin kredite. La ĉiesulino* tuj kuras al la posedanto de la hotelo por fordoni ŝuldon pro la ĉambro, luita por servi la “klientojn”.

Tiun momenton la turisto revenas al la hotelestro kaj diras, ke la ĉambroj ne plaĉis al li, forprenas la garantimonon kaj lasas la hotelon. Neniu el la urbanoj riĉiĝis, sed ĉies ŝuldoj estis nuligitaj kaj la loĝantoj nun optimisme rigardas al la estonto...

Traduko de M.Lineckij

* dankon al Louis Beaucaire pro la vorto, prenita el la fama anekdotaro “Kruko kaj Baniko el Bervalo”

Luiza CAROL

VERO VIVOS



Svarmas malveroj en dikaj manlibroj
pri la nuntempo kaj pri historio.
Plenas ĵurnaloj je falsaj priskriboj
generacio post generacio.

Tro multaj homoj klaĉadas pri tio
kion neniam neniel ekkonis.
Tro multaj homoj konsilas pri ĉio
kvankam neniam nenion scipovis.

Plenas la mondo je aĉaj malveroj
disvastigataj pro homa nescio,
krom mensogaroj kaj mensogeroj
disvastigataj samkiel rabio.

Vortoj de vero perdiĝas en vento,
spurojn de vero la sablo forviŝas,
revoj pri vero fariĝas lamento
kiu dolore, korŝire fandiĝas.

Muĝas la voĉo de fikalumnio;
vero kaŝiĝas en nest' de l' silento.
Serĉi la veron fariĝas defio
pli kaj pli akra en nia jarcento.

Varman gratulon, ho, juna amiko
kiu aprezas la flustron de l' vero,
dum la malver', kiel falsa muziko
fie bruegas surdige sur tero.

Spite al ĉio la vero ne mortas,
ĉar ĝiaj semoj subgrunde ekdormas.
Mute, mirakle, la semoj kaŝiĝas
eĉ dum jarcentoj, sed poste vekigiĝas.

La venanta kongreso - La 21-a Israela Kongreso

La datoj: 2020.04.02 - 2020.04.05

La loko: Tel-Avivo

La kongresa programo

La programo konsistos el duontagaj ekskursoj (matene), prelegoj (posttagmeze) kaj artaj vesperoj kun internacie konataj E-artistoj:
M.Bronŝtejn, la 6 persona Ukraina Ensemblo A.M.U.

La Kongresejo:

Gastejo Bnei Dan, lokita plej centre en Tel Avivo.

Programkosto por ELI-membroj – 150 ₪. Vespermanĝo - 75 ₪ .

Tranokto+vespermanĝo en dulita chambro: ĉ. 350 ₪
po persono po nokto.

La Kongresa kotizo por eksterlandanoj inkluzive loĝadon,
vespermanĝojn kaj programon: 300 eŭroj

Postkongresaj ekskursoj: 05 - 12/4

P1: La Sudo kaj Jordanio 5-10/4 - 600€, sen Jordanio 5-8/4 - 400 €

5.4 Jerusalemo: Oliva Monto, la Templo-Monto kaj la Ora Kupolo, Via Dolorosa, La Tombo preĝejo, la Juda Kvartalo kaj la Okcidenta Muro.

6.4 Beit Leĥem, Jeriĥo, Ein Gedi, banado en la Morta Maro, tranokto: Masada.

7.4 Frumatena grimpadado al Masada, veturado al Eilat tra la Arava dezerto, tranokto: Eilat.

8.4 Jordanio: ĵipa safario en Wadi Rum, dezerta ĉe-beduena tranokto.

9.4 Petra. vespere reiro al Israelo. Tranokto: Eilat.

10.4 Frumatena veturado de Eilat al Tel Aviv.

P2: La Nordo (10-12/4 - 300 €)

10.4 Daŭrigo al Ĥaifa. Posttagmeze: La panoramo de al Bahai ĝardenoj, Stella Maris, la Germana Kolonio. Tranokto: Ĥaifa

11.4 Nazareto, Kapernaum, Magdala, Lago de Galileo. Tranokto: Ĥaifa

12.4 Akko: La kruc-kavaliraj fortikaĵoj (Unesko), la bazono, la maraj muregoj.

Trajna veturado al Tel Aviv aŭ al la flughaveno.

<http://esperanto.org.il/ik.html>.

Aliĝo kaj pliaj detaloj: eli@esperanto.org.il